

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

Enhavo:

Georgo Aktarĝiev: Ni ĉiuj helpu!

Nikolaj Rajnov: La suno faris tion, trad.
S. Simeonov; La juĝo de Oziriso, tr.
G. Ĥarŝev; Mamra, tr. G. Sapunĝiev;
Maya, tr. G. Ĥarŝev; El la „Libro de
enigmoj“, tr. Mimoso.

Stefan Venkov: Nikolaj Rajnov.
Informoj.



Jaro VII

Januaro, 1926

№ 5

703.453-C.Esp

7
1925/26
5-10

BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

STR. CAR BORIS, 69 — SOFIO

Liveras:

Kurso de esperanto, IV eldono (Ada)	20.—	lv.
Praktika gramatiko de internacia lingvo esperanto	3.—	"
Ĉu estas ebla kaj necesa helpa i. l. (prof. Ŝiŝmanov)		
bulgarlingva	3.—	"
„Esperanto“ (prof. Ŝiŝmanov) propaganda broŝureto		
bulgarlingva	2.—	"
Paroladoj de Zamenhof (apartaj kajeroj I—V) bulgarl. po	2.—	"
Internacia Konferenco por komuna komerca lingvo		
(Venezia) bulgarlingva	5.—	"
Esperanto-bulgara vortaro (Har. Baĉvarov) bindita	50.—	"
nebindita	35.—	"
„ “		
Slosilo de esperanto	4.—	"
Esperanto-bulgara frazaro	8.—	"
Albumo de Bulgaraj esperantistoj (eld. 1923)	25, 35.—	"
Rememoroj de esperantisto (Ada)	20.—	"
Bulgara Antologio (lv. Krestanov)	100.—	"
Ŝercoj kaj incitoj (200 ludkartoj kun demandoj kaj resp.)	60.—	"
Apartaj numeroj de gazeto „Bulgara esperantisto“		
jaro II, III, IV, kaj V	1.50	"
jaro VI	2.50	"

Insignoj, propagandaj kovertoj, poŝtkartoj, portreto de Zamenhof.

por poŝtelspezoj oni aldonu: en Bulgario 15%, en aliaj landoj 30%.



BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO :
por Bulgario
40 levoj,
por alilando
2.50 sv. fr.
aŭ egalvaloro

MONATA ORGANO
DE LA BULGARA ESPERANTISTA
SOCIETO

Adreso
de la Redakcio
kaj administracio :
Sofia (Bulgario),
strato Car Boris, 69

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado por la lernejoj-bibliotekoj
per cirkulero № 1870 de 27. januaro 1922

Ni ĉiuj helpu!

Gesamideanoj,

Nia movado estas minacata. La katastrofa deficito de la XVI-a Universala Esperanto-Kongreso en Vieno devas esti pagata de la tuta esperantistaro. La LKK, dekdu maljunuloj kaj junuloj, entuziasmaj esperantistoj, idealistoj, pioniroj de nia sankta afero, sed ĉiuj malriĉaj homoj, pensionuloj, oficistoj kaj spiritaj laboristoj ne povas kaj ne devas esti lasataj en danĝero ke ilia ekzistado estu detruita. Ili klopodis aranĝi por la esperantistaro grandiozan feston en la ĉefurbo de Aŭstrio kaj helpis antaŭenpuŝi nian aferon kreskigante ĝin en la okuloj de la mondo, ĉar la morala sukceso de la Viena kongreso estis grandega. La membrojn de la LKK en Vieno minacas procesoj. Malindulgemaj kreditoroj kun kontraktoj en la mano, kiujn subskribis en la nomo de la esperantistaro la nelacigebla ĝenerala sekretario de la Viena LKK, jam staras antaŭ la pordo de la juĝejo, kie ili kompromitigos nian sanktan idealon por gajni sian monon kune kun procentoj kaj advokataj kaj juĝejaj kostoj. Tiun monon devos pagi la subskribinto de la kontraktoj. Ĉu ni povas indiferece konsenti, ke la samideanoj en Vieno, kiuj aranĝis belegan esperantistaran feston, nun pagu nian ĝojon, nian plezuron, nian fierecon pri la sukceso de nia afero per sia propra mono?

Ne, ni ne povas permesi tiun neaŭditan skandalon. Per mondonacoj ĉiuj bulgaraj esperantistoj helpos laŭforte faciligi la sorton de niaj vienaj samideanoj. Ĉiuj sekcioj de la bulgara esperantista societo kolektu monon, kiamaniere ili plej bone povos, kaj sendu la kolektitajn sumojn laŭeble plej frue al la sekretario-kasisto de la B. E. S. La C. K. zorgos pri la plej baldaŭa forsendo de la mondonacoj al sinjoro Sos en Vieno.

Ni helpu! Kaj ni helpu senprokraste. „Doble donas, kiu tuj donas!“

Georgo Aktarĝiev,

Prezidanto de la Bulgara Esperantista
Societo.

Nikolaj Rajnov.

La Suno faris tion

Ni estis en du malproksimaj mondoj kaj la sorto kunigis nin ĉe la montobazo de Lebanon'.

La vento faldis ŝiajn orbuklojn, kaj la ruĝa suno rebrilis en la lazuro de ŝiaj okuloj. En la blua senfundo de ŝiaj pupiloj dormis voĉo de mortaj legendoj.

Ŝi marŝis kun mi, rememorinte la malproksiman urbon, el kie ŝi ĵus estis alveninta, kaj en mia memoro delonge estis malaperinta la memoraĵo pri la patrolando.

Kaj ŝi rakontis pri la grandaj blankŝtonaj preĝejoj de sia urbo, pri la ora arbaro de kolonoj, kupoloj, krucoj, — pri la gajoplana festo de multkoloraj fenestroj, pri la serena silento de flamiĝintaj kandeloj kaj pri la milda flustro de blankaj junulinoj portantaj nigrajn monahinajn vestojn.

Kaj en mi vekigis dormantaj memoraĵoj: mi vidis la malnovan vilaĝan muelejon kun verdiĝintaj malsekaj ŝtonoj, — la bukloharan hundon kun ĉifonsimila vosto, — maljunan kurbigitan virinon kiu min gvidas ien per mano, — la polvoplenan vojon preter la vilaĝo, — la ombron de grandaj branĉoriĉaj nuksarboj, — la gajan ludadon sur la herbejoj, kie odoras je kamomiloj, sovaĝaj rozarbetoj kaj viburnoj.

Surdigita parolo atingis min elmalproksime: parolo de homoj, jam mortintoj, kaj kies vizaĝojn mi ne povis rememori...

Ekrigardinte la vizaĝon de la junulino, en la ĉagrenaj trajtoj de ŝia buŝo, mi aŭdis la kanton, kiun al mi kantis antaŭ jaroj mia mortinta patrino.

Kaj ŝi parolis pri la glaciaj fabeloj de sia malproksima lando, pri pezaj neĝ-vualoj, pri blanka mansardo, kie gaja vira voĉo kantas malnovan romancon kaj flavkolora samovaro bolas, — kunkantas rapideme al la kanto...

Ŝi estas kunvivinta kun tiu juna homo, sed nun li estas for.

Ŝi ne scias kie li estas.

Eble li mortis...

Kaj super ni leviĝas altaj ŝtonegaj nestoj, kie estas dissemnitaj mirindaj domoj, enmasonitaj en la ŝtonon.

Tie loĝas homoj, memvole forlasintaj la mondon kaj ĝian ĝojon, — fermintaj rigardon en sia animo, — mortigintaj memoron pri ĉiu pasintaĵo. Super ruiniĝintaj muroj vidiĝas iliaj blankaj turbanoj; sur la verdaj arbobukedoj sur la deklivo aperas blankaj vestoj de ermitoj — druidoj.

La vojeto estas kruta — kaj la fremda junulino apogas sin je mia osta manplato pro timo de falo.

Sub ni rondaj plataĵoj malfaldas verdan silkon — kaj homoj kun turbanoj marŝigas ŝarĝitajn azenojn sur la vojeto.

La junulino marŝas antaŭ mi.



La maldika vesto konturigas belforme ŝian korpon. Larĝa ĉapelo ĵetas violan ombron sur ŝian vizaĝon.

Ŝi turniĝas.

Sur ŝia buŝo faldiĝas malkuraĝa rideto.

Ŝi spiras rapide.

En ŝia rigardo brilas aŭdaca proksimeco, ŝiaj naztruoj larĝe malfermiĝas, ŝia brusto leviĝas supren — supren. — Nevole ŝia kapo ĵetklineiĝas malantaŭen — kaj ŝia buŝo konvulsias por ensorbi la dolĉon de fremdaj lipoj.

Ŝiaj okuloj flustras vortojn, kiujn la buŝo rifuzas eldiri . . .

La nuboj fandiĝas, kiel delikataj revoj en la bluaĵo.

Sukplena pasio brulas en la rigardoj — kaj la koro batas malegale, rapide. La luma akvofalo de la momentoj forportas la animon en kapturajn valojn, kie la paŝo apogas sin nur sur la aero . . .

La Suno faris tion!

Vinberaroj da brilo pezas super ni.

Kaj la junulino rememoras la velurajn fabelojn de la infaneco.

Kaj ŝi diras:

— Jen —: Furiozulo flugas super arbaroj, plataĵoj kaj ŝtonegoj! Li logas la fruajn ĝermojn al la Suno — kaj la floroj elkreskas por disbati per verda ŝildo la malsekan teron. Kaj la tero estas malsana, ŝi fandiĝas pro pasio, ĉar baldaŭ ŝi sentos sin patrino: homo traplugis ŝian korpon, mano ĵetis orajn semojn — kaj baldaŭ flugrapide ŝprucos verda vintraĵo. La gaja pasio de la printempo brilas kaj delogas, la gaja forto de la Suno boligas la sangon: la Suno premas la teron en fajra ĉirkaŭpreno . . .

— Kaj ni, la homoj? — Mi demandis.

Ŝi silentas kaj pro ĝeno ne levas okulojn por rigardi min. Ŝi ne komprenas min.

Ŝi komprenas — sin mem . . .

— Ni — rekomencas mi — ĉu ni komprenas la Sekreton de tio, kio okazas? Ni marŝas — kaj ni rememoras vortojn, kiujn ni legis ie . . .

Ŝi rigardas min per ĉagrena rigardo.

Ŝi ne komprenas min.

La vojeto volviĝas preter sovaĝaj ŝtonegoj — kaj perdiĝas ien.

La homoj kun la turbanoj estas malproksime.

Ni estas solaj.

La junulino timas: proksime de ŝi neniu estas. Nur mi estas — nekonata homo . . .

Mi sidas sur la ŝtonoj kaj rigardas. Antaŭ la okuloj deklivas en abismaj valoj akraj pintoj, kaj arĝentkoloraj riveretoj disbatiĝas de ŝtonmonteto al alia.

Ŝi staras apud mi kaj ankaŭ rigardas — ŝi rememoras la poemojn skribitajn iam de la kantistoj de ŝia naskolando.

— — — — —
„Ŝi amis Lin.

„Kaj Ŝi arĝentan ponardon enigis en Lian koron.

„Dum la sonorado de meznoktaj kloŝoj Ŝi enigis tranĉilegon en Lian koron.

„Ĉar Ŝi amis Lin“.

— — — — —
Mi ne komprenas ŝian kanton.

Kiam la okuloj malklariĝas, kantoj ne estas.

En mia animo estas paco — kaj la sonoj falas kiel tranĉiloj, sub kiuj ŝprucas sango — kaj doloras . . .

— — — — —
Super ni brulis serenaj malproksimoj, la suno rompis longajn radiojn kaj ĉirkaŭ ni estis silente kaj blanke.

Kaj ŝi komprenis, rigardis min kaj ĉesigis sian kantadon. — —

Poste ŝi proksimiĝis kaj sidiĝis ĉe min.

Kaj ŝi rigardis min kiel petolema infano, kiu bedaŭras, ĉagreninte pli aĝan fraton.

En ŝiaj okuloj brilis muta konfeso.

Ŝiaj brakoj ĉirkaŭprenis mian kapon kiel arĝenta rikoltilo.

Kaj la vivo bruis post ni — malproksima kaj forgesita . . .

Super mi brilis Suno.

En mia animo sonoris ŝia rompita kanto.

Kaj ĉirkaŭ mi lumis ringo de blankaj brakoj.

Mi rigardis ŝin.

En ŝiaj okuloj vibris la lazuro de malvarma ĉielo, ŝiaj vangoj brulis proksime de mia buŝo, kaj en ŝia ĉirkaŭpreno ŝprucis sango, memoro kaj pasio.

En ŝian animon falis rozoj: — sangkoloraj, ruĝaj, dornplenaj . . .

En mia koro fandiĝis granda glacia montego — kaj tra miaj vejnoj glitis fulmo. — —

. . . Mi paco fleksis la manon — kaj ŝian korpon mi alpremis al mi. Mia buŝo serĉis la ŝian, kaj okuloj miaj trinkis la bluan de ŝia rigardo . . .

— — — — —
La Suno faris tion.

Pleven.

Trad. Simeon M. Simeonov

Kara samcelano! En la nuna momento vi plej trafe helpus nian movadon, se vi abonus al „Bulgara Esperantisto“. De vi ne estas petata almozo: la revuo ja donas al vi 12 kajerojn da valora esperanta legaĵo.

N. Rajnov

La juĝo de Oziriso

La reĝino Maat-Ka-Re mortis. Iun nokton ŝia animo transpasis la ondojn de la ĉiela Nilo kaj ekstaris meze de bela ĝardeno antaŭ la fajra trono de Oziriso. La ĉiela juĝisto rigardis ŝin kaj diris: „Vi ne ŝajnas esti kandelingo taŭga por la oleo de mia favoro“. La reĝino Maat-Ka-Re tremis kaj diris al la juĝisto: „Sunokula potenculo, faraono de la justeco, mi pekis multon, sed vi ne donacis al mi infanon. Se vi donus al mi idon, eble ĝi sunigus mian mallumon kaj ŝanĝus miajn malbonojn en florojn de virto“. Tiam Oziriso ridis la virinajn vortojn, sed pripensinte iom, li diris al la ĉiela boatisto: „Konduku la reĝinon transen. Sia peto plenumiĝu, ĉar ŝi deziris ĝin tutkore“.

Kaj la reĝino Maat-Ka-Re ektremis kaj vekigis: „Kian timigan sonĝon mi vidis!“, ŝi diris mallaŭte kaj frotis siajn palpebrojn kaj stariĝis. „Kion signifas tiu sonĝo? Kaj kial mi petis la faraonon de la justeco doni al mi infanon?“ Tiel la reĝino Maat-Ka-Re diris al si kaj venigis la antaŭdiriston, kiu devualigis kaj rakontis al ŝi ĉion.

La maljunulo diris: „Mi komprenis vian sonĝon. Tiu sonĝo estas tuta veraĵo. Vi estis morta ĝis hodiaŭ kaj deĉest nun vi devas vivi en la animo de via filo. Ĉiu viro portas ion virinecan interne en si: vere estas. Pli da vibro kaj miro, pli da pacema kareso kaj honto bezonas la vira animo. Le timiga tremo malfortigas la virinon, sed la viro estas kuraĝa ankaŭ sen tiu tremo. La mirindaĵo plantas superstiĉon en la virinon, sed la viro estas kruela sen kredo en kia ajn mirindaĵo. La kareso malĉastigas la virinon, ĉar ŝia animo kutimas kaj ne povas vivi sen karesoj, sed la viro bestigas aŭ estiĝas murdisto sen la karesemo. La honto estas kara ornamo por la virino, sed en la vira animo ĝi povas vegeti neniam. Kiel vi vivus en la animo de via filo, reĝino, se vi ne povas planti tie la ĝermon de la supera honto?“

Tiam la reĝino Maat-Ka-Re diris mallaŭte: „Jes. Mi estis morta ĝis nun, ĉar mi ne vivis en la animo de mia infano. Sed kiamaniere mi plantus, vere, en la animon de mia filo la grajnon de la honto, se ĉiu viro estas senhonta? Kaj ĉu ekzistas virto senhonta? Ĉu ne ĉiu virto estas ja honta!“

Kaj la maljuna antaŭdiristo prenis la randojn de sia mantelo kaj ekforiris, sed je la sojlo li turniĝis al la reĝino Maat-Ka-Re kaj flustre diris al ŝi: „Kiel vi instruus al li la honton? Eble, parolonte neniam pri honto...“

Kaj en la mistera murmuro de la antaŭdiristo la reĝino Maat-Ka-Re aŭdis la dian ridon de Oziriso, kiu sendis ŝin sur la teron.

Trad. G. Ĥarŝev

Plej agrabla donaco por via amiko estas abono al „Bulg. Esp.“.

Mamra

„Nenion vi estas aŭdinta pri Mamra: pri Mamra mi rakontos al vi:

„Ho, Mamra: tinta sonĝo de arĝenta kunstelaro! Ho, Mamra, kruta vojo tra glacio kaj neĝo!

„Saheb: se vi estas ĝuste komreninta la sekreton de l'animo — vi konas Mamra'n!

„Ho, Mamra: tombo de fabeloj, faroj kaj popoloj!

„Pri Mamra vi nenion aŭdis: mi rakontos al vi pri Mamra.

„Mamra estas Spirito — kaj Mamra estas Virino. Mamra estas varmega sonĝo kaj magia ĵuro.

„Mamra nomas la beduenoj de Lebanon la grandan Dezerton, kie la enamiĝintoj mortas timigite de vitrovizioj...

„Mamra estas tombo — kaj Mamra estas surtomba ploro“.

— — — — —

Tiel parolis la maljuna kamelisto, en kies tendo mi loĝis.

„Terurplena estas Mamra, Saheb!“

— Eh, kiu estas Mamra?

„Mamra forbalaas ĉion sur sia vojo. Por Mamra mi junaĝe perdis tricent kamelojn. Mamra ilin prenis“.

„Ĉu Mamra estas la simuno?“

„Ne estas, Saheb! La simuno ne estas Mamra. Mamra estas pli terura ol la simuno“.

— — — — —

Kaj lia filino, la belulino Hanuke, haltis, aŭdinte tiujn ĉi vortojn, — demetis la kruĉon desur sia ŝultro — kaj ŝia nigra hararo falis simile al nigra nubo sur ŝiajn ŝultrojn.

„Dum mia juno Mamra sorbis mian sangon: kiel lunatikulo mi vagis, kaj trankvilan lokon mi ne trovis.

— Ĉu eble Mamra ne estas la fajro-malsano?

„Ne estas, Saheb! La fajra malsano ne estas Mamra.

Ĉi estas pli timiga ol kiu ajn malsano“.

— — — — —

Kaj Hanuke min rigardis: en ŝiaj okuloj brilis la ora laco de l'Arabia suno kaj siblis la fulmo de venĝanta beduena ponardo.

Kaj mi, la kompatinda blanka homo, staris frostigite de ŝia rigardo, kaj aliloken rigardi mi ne kapablis...

„Mamra puŝas la homon al malhonoro, kaj igas lin al malbonfaroj. Mamra metas en la manon de la viro glavon, kaj en la vejnojn de l'virino fajrigas tempeston.

„Mamra gvidas la homon al hontigaj vojetoj — kaj li malestimias sin, sed li estas nekapabla sin limigi... kaj estas malfrue por reveno.

— Mi komprenas: Mamra estas frenezo!

„Ne estas frenezo, Saheb: pli terura estas Mamra. Ĉi kunigas ĉiujn frenezojn. Ĉi estas danĝera kiel vagulo — gnomo: elnevideble ĝi atakas!...“

Kaj Hanuke staris.

La rabia lumo de ŝiaj okuloj mallumigis la brilon de ŝia perla kolornamaĵo.

Mi staris kiel fera skulptaĵo — kaj rigardis . . .

„Mamra estas . . .“

Kaj en min rampis la timo de sanga enamiĝo — kaj mi komprenis momente la danĝerajn vojojn de varmega pasio . . . i

„Mamra . . .“

Kaj la maljunulo rakontis, sed mi nenion plu aŭdis . . .

Mi rigardis Hanuke en la okuloj — kaj tie mi vidis mian pereon, kaj tuje mi ekkonis — kiu estas Mamra. — —

Trad. Georgi Sapunĝiev

Maya

En la malgajaj tagoj, kiam la granda Budha, Tathagata¹⁾ en figuro de homo, kiu enkorpiĝis por savi la mondon el la iluzio, sidis sub la arbo Bodhi²⁾ kaj meditis pri la vojoj de Kama,³⁾ la kvar grandaj veroj⁴⁾ kaj la okobla⁵⁾ savo-vojo, mildaj sonoj de vina⁶⁾ alvenis al liaj oreloj.

Kvazaŭ en la trankvila vespero malpeza venteto kurbigis siajn fingrojn sur nevideblaj kordoj kaj disĵetis kuprajn sonojn — kiel perlo-grajnoj, kiuj falas sur oran ŝildon. La kanto vibris en tiel mildaj nuancoj, ke la najtingaloj, kiuj estis ĉirkaŭe, eksilentis kaj aŭskultis, la rivereto ĉesigis sian cimbalan plaŭdon kaj la flustrado de la folioj mallaŭtiĝis: la ĉielo kaj la tero aŭskultis la kanton de la nevideblaj fingroj.

Kaj tiu, kiu estis ekirinta tra la vojo de l'medito al la palaco de la silento, kiun la antikvuloj nomas „Nirvana“,⁷⁾ haltigis siajn paŝojn kaj ĉirkaŭrigardis konfuzite. Farinte bone ĉiujn siajn ekzamenojn, li opiniis, ke tiu kanto estas la voĉo de liaj antaŭirantoj sur la vojo de la abnegacio kaj ke ĝi alvenis al li, por ke ĝi donu al li fortojn fari la lastajn paŝojn sur la kruta vojeto.

Tial la granda Tathagata el la gento de la Sakias aŭskultis por aŭdi kion flustras la ĉiela kanto, por ke lia spirito trovu en ĝi edifon.

Kaj al liaj oreloj alvenis la jenaj vortoj:

— Majstro de Dharma⁸⁾ kaj predikanto de Nirvana. La reĝo Sudhodana, via patro kaj flegato, jam sepdekjarulo, atendas la

¹⁾ Kiu iras post siaj antaŭuloj.

²⁾ Saĝeco de Dio.

³⁾ Natura leĝo, laŭ kiu la kaŭzoj kaj la sekvoj estas forte ligitaj. Tre ofte la efikoj de la kaŭzoj estas efektivigataj en kelkaj vivoj.

⁴⁾ Ili estas: sufero, elirebleco, vojo de liberiĝo kaj liberiĝo.

⁵⁾ Sankta nombro de la Budhismo.

⁶⁾ Orienta muzikilo.

⁷⁾ Stato de neestado, superestado.

⁸⁾ Leĝo pri la devo; laŭ ĝi ni devas fari nur tion, kio estas por ni

morton: liaj haroj blankiĝis pro malĝojo al vi, li elploris siajn larmojn post tiu, kiu ekiris per savi sian animon en solecaj ermitejoj, ĉiumatene li eliras per tremantaj piedoj por atendi sian filon kiu forlasis reĝan tronon kaj popolon por serĉi azilon de sia animo. Tiu reĝo jam estas en la fino de sia vivo kaj la fajro-ŝtuparo atendas por akcepti liajn ostojn: kion faros la malĝoja popolo sen reĝo kaj gvidanto? Rekonsciiĝu, princo Sidharta, revenu ĝustatempe en Kapilavastu, ĉar la animo de centmila popolo valoras antaŭ Brahma pli ol via malgranda animo! Kies flustro tentis vian piedon forpuŝi ĝin en la vojetojn de malhonora fugo for de devo kaj respekto al popolo kaj patro?

Aŭdinte tiujn vortojn, Gautama Budha diris en sia animo: „Tiu voĉo, kiu ordonas — mi ne scias el kie — eble estas prava. Sed ĝi diras aĵojn fremdajn al mia animo. Ĉu reĝo Sudhodana? Ne, mi ne konas tiun homon. Ĉu reĝa trono? Ne, tio estas nekonata al mi. Kion volas diri la kanto?“

Kaj li pripensis; ĉiuj tagoj de lia vivado viciĝis en returna vico antaŭ la rigardo de lia animo, kaj atinginte la tagon de sia naskiĝo, li rememoris ĉiujn siajn pasintajn enkorpiĝojn⁹⁾ sur la tero.

Kaj tiam li diris al si:

„Estas vero en tiuj vortoj. Jes . . . iam mi eble estis princo kaj heredonto de reĝo Sudhodana . . . Tiu homo eble estas ankoraŭ vivanta, sed princo Sidharta mortis. Pereis la juna heredonto de la trono en Kapilavastu: mi vidis per miaj okuloj, kiel li eligis sian lastan spiron ankoraŭ antaŭ ol li atingis la arbon Bodhi. Tiu kanto ne parolas pri mi: mi ne scias, kiun ĝi trafas“.

La voĉo de la ĉiela kanto mallautiĝis, sed ĉe tiuj-ĉi vortoj ĝi denove laŭtiĝis kaj klare ekparolis:

— Heroldo de la okobla vojo kaj venkanto de la sufero! La nekonatulo parolas pri vi kaj vin alvokas al returna vojo. En Kapilavastu vi lasis vian edzinon Yasodara kaj vian filon Rahula, sopirantaj por edzo kaj patro. Kiel fuganto vi forlasis vian fajrujon por serĉi glaciajn vojetojn kaj suprojn, sur kiuj siblas malvarma vento. Ĉu vi trovis ion pli ol kion vi perdis? Vi esploris la vojetojn de Karma: ĉu vi scias, kio atendas viron, kiu forlasis siajn edzinon kaj infanon por serĉi savon por si mem? La bedaŭrinda Yasodhara delonge jam surportas vidvinajn vestojn, kaj la malgranda Rahula ploras pro la morto de sia patro: kies mano forviŝos tiujn larmojn? Revenu en vian hejmon, dum estas ankoraŭ frue, ĉar alia homo devas enterigi la mortintajn pro malĝojo al vi!“

Tiuj ĉi vortoj pikis la koron de Tathagata kaj li estis preta verŝi larmojn de pento. Duone turninte sian kapon malantaŭen, li intencis ekiri la vojon al Kapilavastu, kiam ies milda mano haltigis lin kaj li rekonsciiĝis.

Poste li pripensis profunde kaj diris malgaje:

⁹⁾ Laŭ la budhismo, evoluante, la homo akiras perfektecon ne nur dum unu vivo, sed en multaj vivoj sur la tero.

„Jes, iam princo Sidharta estis edziniĝinta. Li lasis edzinon kaj infanon por iri en la dezerton. Sed kiu estas princo Sidharta? Mi ne konas tiun homon: li estis juna kaj amis unu edzinon kaj unu infanon, kaj nun sub la arbo Bodhi sidas blankharula maljunulo, kiu amas per egala amo ĉiujn homojn kaj ĉiujn kreitaĵojn de Dio. Ĉu pri mi parolas tiu voĉo? Mi scias: iam Tathagata estis tigro kaj Yasodhara — tigrino, poste li estis subakviĝisto, kiu vivas per kaptado de perloj, kaj ŝi — lia edzino; fine li estis princo Sidharta, kaj ŝi — Yasodhara, princino de Kapilavastu kaj edzino de la juna heredonto de la reĝa trono. Sed jen Sidharta fariĝis Tathagata kaj super li tremas la Stelo de la Dia Sendito, kaj Yasodhara sidas en la palaco kaj atendas la malaperintan princon. Ĉu ŝi atendas Tathagata-n? Ne. Tathagata surportas flavan mantelon, lia kapo estas razita, liaj ŝultroj estas nudaj, li surportas ligno-sandalojn kaj telereton de almozulo; kaj princo Sidharta estis vestita en oro kaj ornamita per diamantoj; ŝi eĉ ne rekonas tiun ermiton sen nomo, kiun jam konas neniu. Tiu voĉo ne parolas pri mi!

Kaj per firmaj paŝoj Gautama revenis sub la arbon Bodhi. Tiam la voĉo mallaŭtiĝis kiel mallaŭtiĝas venteto, forfluginta profunde en la arbaron; kaj la sankta ermito sentis denove la mildan manon sur sia ŝultro — kaj en lia animo ekparolis alia voĉo: li mem ne sciis, ĉu ĝi estas la voĉo de lia propra spirito aŭ la voĉo de Brahma.

Kaj jene ekparolis tiu kaŝita voĉo:
— Ho, Tathagata, portanto de la Saĝeco, kandelingo de la Savo, sendito de la Amo! Maya¹⁰⁾ parolis tion. Ĉu vi ne scias, kiu estas Maya?

Kaj Gautama Budha rediris:
— Dio! Ĉu mi ne konas Maya-n? Ŝi ja estas mia patrino. Sed la voĉo diris:

— Antaŭ kelke da tempo Maya estis vere via patrino; Maya estis patrino de la tigro, perlo-kaptisto kaj princo Sidharta, sed Maya ne estas patrino de Tathagata; lia patrino estas Nirvana.

La voĉo de Dio mallaŭtiĝis, kiel mallaŭtiĝis ankaŭ antaŭ tio la voĉo de la Granda Iluzio.

Tiam Budha, lumigita el supre, travidis elfunde la iluzion, kaptintan la mondon — kaj diris mallaŭte al si kaj al la tuta universo, katenita en lia animo:

„Maya — la Granda Iluzio — naskis, mamnutris kaj mortigis nin ĝis hieraŭ. Ho, mia mondo, mia tero, kiu atendas min — vian sunon — leviĝi, por ke vi nasku herbojn, palmojn kaj arbojn, por ke vi nasku bestojn kaj sovaĝo-bestojn, por ke vi kreu korpojn de homoj, kiujn mia animo vivigos kaj enloĝos: ho, mia tutmondo, tra nia Granda Yuga¹¹⁾ ne estos plu Maya! Kiu min naskis, tiu naskis min por lasta fojo: apenaŭ nun ne

¹⁰⁾ Sanskrita vorto, kiu signifas iluzion; la patrino de princo Sidharta ankaŭ nomiĝis Maya.

¹¹⁾ Granda periodo de tempo; ĝi estas skribata per 17 ciferoj.

ludos la vina de Maya kaj la oraj skvamoj de la Tutmonda Serpento fandiĝos, ĉar fandiĝos ĉiu iluzio kaj malaperos ĉiu sufero, naskita de la iluzio. Kial ĝis nun suferis la homo? Kial li trompis sin? Li flugis post la ĝojon, kaj la ĝojo estas mallonga: post ĝi venas longa malĝojo; li trinkis pasion kaj la pasio estas vino: post ĝi la soifo kreskas, sed ĝi ne estas satigata; li nutris sian animon per gloro, sed la gloro estas falsa nutraĵo kaj la homo eterne malsatos, se li nutrus sin per ĝi. Maya eksidis en lia animo kaj ŝi parolis al tiu animo la jenon: „Vi estas la valoraĵo de ĉiu estado“. Li amasigis personan virton, personan konon, personajn diferencojn kaj signojn, per kiuj li povus brili antaŭ la aliaj. Kaj Maya subigis lin. Kaj vi, miaj homoj kaj mia gento, ne nutros vin per iluzioj: vi scios, ke la pluvo, kiu nun pluvas kaj falas je apartaj gutoj sur la teron, en la ĉielo estas la tuta nebulo, kaj falinte, ĝi fariĝos tuta torento; nur en la transiro de la tero al la ĉielo estas gutoj, sed supre kaj malsupre estas tuteco; iluzio estas ĉiu penso pri la aparteco. Mi kaj vi kaj Brahma kaj la mondo — estas unu. La sinfero estas nia vojo; nia venko estas la tago, kiam malaperos ĉiu aparteco. Jen: en mia animo ploras Yasodhara ne kiel princino, forlasita de sia edzo, sed kiel suferanta virino, kiu ne scias, ke la ploro mem kaj la malĝojo mem kaj la sufero mem — estas iluzio. Kaj Tathagata ploras kun ŝi — ĝis la tago, kiam Yasodhara komprenos, ke la savo estas en la venko de la aparteco, de la iluzio, de la sufero. La pluvo ĉesos baldaŭ, miaj homoj, kaj tiam ĉiu vidos, ke la gutoj fariĝis torento“. Kaj kiam li diris tion, la pluvo vere ĉesis. Trans la granda arbaro, plenigita je ermitoj, sin volbis sepkolora ĉielarko — kiel kara ventumilo, per kiu Maya trompas la homajn okulojn. Sed por la rigardo de Tathagata la ĉielarko estas ponto, kiu kondukas la animojn de Samsara¹²⁾ al Nirvana kaj promeso de Brahma, ke la gutoj — animoj fariĝos Maro.

Kaj stariĝinte kun heliĝanta vizaĝo, li diris al si:

„La radio vidas sep kolorojn en tiu majesta ventumilo: flava, ruĝa, viola, profund-viola, blua, verda kaj oranĝa, kaj tiuj sep radioj estas unu: la blanka radio, nevidebla por la rigardo, kaptita de Maya. Jen venas tago, kiam ĉiuj koloroj kunfandiĝos kaj ĉiuj koloroj malaperos. Ĉar la Eterna Suno leviĝas — kaj ĝia lumo estas blanka“.

Trad. Geo Haršev

¹²⁾ La iluzio, en kiu nun ni vivas; ega signifa al Maya.

La 18-a Universala kongreso de Esperanto kaj Internacia Somera Universitato okazos en Edinburgo — 31. Julio ĝis 7. Aŭgusto 1926.

Aliĝilojn oni petu. Kotizo: por ĉiu kongresano — 20 ŝilingoj = 20 Germ. ormarkoj = 25 Svis. fr. = 5 Uson. dol.

Por la Somera Universitato jam estas aranĝitaj fakultatoj pri Folkloro, Lingvistiko, Medicino k. a. sciencoj.

Adreso: Sekretarioj, 18-a kongreso de Esperanto, Edinburgo, Skotlando.

N. Rajnov

El la „Libro de enigmoj“

Knabino el Megido estis kantanta:

Miaj brakoj estas kiel branĉetoj de oranĝa arbo. Mia brusto estas super diafanaj akvoprenoj fajro. La viroj timas pro mia beleco.

Ekdemandis ŝin la vento:

Knabino el Megido, ĉu viaj manoj semas morton? Ĉu via ĉirkaŭpreno portas bruladon? Ĉu mortas antaŭ vi la viroj pro timo?

La knabino el Megido ne aŭdis

Ŝi daŭrigis sian kanton:

Miaj manoj estas timemaj kiel birdoj antaŭvespere en forrikoltitaj gren-kampoj. Mia brusto estas glacia spegulo turnita ĉielen. Mi timas la rigardon de ĉiu viro.

La vento modulis super ŝi, en miro delasis flugilojn kaj poste ekspiregis pro rido kaj ekflugis foren, forportinte la finon de la kanto kaj frapis la knabinon per aro da oraj folioj.

* *

Nigra floro falis en mian animon, nigra malgajo rosumis mian frunton. Eksvingu per mirtaj branĉetoj super mi, filinoj de Van, por ke vi dispelu mian malgajon per belodoroj kaj kantoj!

En la kanton de nigra fluto enverŝis mi animon mian — kaj malplena estas mia koro. Super min falas nigraj floroj, nigraj ĉagrenoj ornamas mian frunton. Gajigu min, filinoj de Van!

Timemaj kaj palaj estas miaj lumiloj, ĉar li forportis ilian lumon en sian rigardon. Li foriris kaj kovris min per nokto. Li malaperis kaj enfaldis min en malgajon.

Priploru min filinoj, priploru min, filinoj de Van!

* *

Tiuj al kiuj vi iras ne diros al vi la vortojn, kiujn vi aŭdis de mi. Ili ne scias mian lingvon: ili ne konas la lingvon de la amo.

Ili plenigos per sango la kandelingon super via lito kaj per ventumilo forpelos de via staturo la belodoran polvon de niaj kisoj.

Ili ebriiĝos pro la tinto de viaj braceletoj kaj falos kiel mortaj antaŭ la brilado de via rigardo. Sed neniu diros al vi: „Vi fariĝas mia kanto“.

La ventego de viaj okuloj estingos multajn animojn, sed neniu diros al vi la vortojn aŭditajn de mi. Ili ne ekparolos: „Vi estas mia sonĝo“.

Malfrue estas: Iru al ili! Miaj manoj premas la ombron, kiu iam estis vi mem.

* *

La boato estas preta. La remistoj atendas. Demetu vian kovrilon! La nokto estos via kovrilo. Demetu viajn vestaĵojn! Miaj sonĝoj fariĝos por vi vestaĵoj. Ni pasos kune transen, kie komenciĝas la malhelo, de kie neniu estas reveninta.

La boato estas preta. La remistoj atendas. Demetu vian ĉirkaŭkolon! Miaj brakoj estos via ĉirkaŭkolo. Malbutonumu vian zonon: la mallumo fariĝos por vi zono. Ni pasos transen kune, kie komenciĝas la forgeso, de kie neniu estas reveninta.

La lumilo treme forsendas la nokton en nia soleca domo. La rivero malrapide trenas sian savanon en la mallumo. La steloj brilas kiel kandeloj ĉe enterigo. Ĉirkaŭ ni estas malhele.

En ni estas malhele.

La boato estas preta. La remistoj atendas.

Mi marŝas sur la strato kaj timas, ke la polvo makulos mian vestaĵon. Dio volas, ke mia vestaĵo estu pura.

Mi parolas kun la homoj kaj timas, ke iliaj vortoj nigrigos mian blankan animon. Dio volas ke mia animo estu pura.

Mi loĝas en la ĝardeno de miaj sonĝoj kaj timas ke la vojetoj restos blankaj kaj puraj. Dio volas sangon sur miaj vojetoj kaj suferon en la ĝardeno de nia sonĝo. Trad. MIMOZO

Nikolaj Rajnov

Bardo de la dezerto

Sur la krucvojo de la ardanta oriento al la malvarma okcidento, de la sunplena Azio al la neĝa Okcidenteŭropo okupas lokon nia naskejo, — la regiono de rozoj kaj pinarboj, la lando de la kapturaj suntagoj kaj glaciaj tempestoj. Kaj en la animo de nia popolo kunplektas sian potencon du spiritoj, — ĉu ekstremaĵoj luktas inter si por supereco: — la dezerto, dezertardo, la fabela ĉarmo de l'oriento kontraŭ la kultura kaj grizĉiela okcidento. La okcidenta kaj orienta parto de l'mondo kuniĝas kaj disiras ĉi tie en la animo de la Bulgara popolo. Niaj popolkantoj, trezorejoj de spiriteco kaj miraj fabeloj, rebrilantaj ĉiujn detalaĵojn de la Bulgara gentkapableco kaj komuna gerio, spegulo de la popola animo, plej bone elokventas pri la subtilaj kunplektoj de ambaŭ ĉi animoj. En la Bulgaraj popolkantoj sentebles la spiriteco kaj ardeco de l'dezertoplana oriento kaj samtempe la glacia alblovo de l'nordo. Du animoj — la animo de l'oriento kaj ĉi de l'okcidento estas enigitaĵ, kunplektitaĵ en unu — la animo de nia popolo. Ili luktis inter si por supereco kaj ĉiam la okcidento venkis. Ĉiuj Bulgaraj poetoj ĝisantaŭ Rajnov estis influitaj de l'okcidenteŭropa literaturo kaj en siaj poeziaĵoj plejparte devastigis kaj elradiis la okcidentan influon. Dum multaj dekjaroj la glacio de la okcidenteco katenis nian literaturon kaj la orienteco, la orienta spirito dormetis en kaŝanguloj de l'popola animo, atendante batalantojn en la kampo de l'poezio, kiuj per fajra glavo povus doni al ĝi ekzistrajton, vojon al hela estonteco kaj partopreno en la sanktejo de la enlanda arto. La bulgara literaturo,

precipe la poezio, kreskis postkiam la bulgaroj konatiĝis kaj ekimitis la okcidenteŭropan poezion, aŭ pli prave ĝian internan spiriton. Sed . . . venis la strangulo Rajnov kaj revekiĝis ĉio kara en nia poezio. La poeto-sorĉisto eliris el la animo de sia popolo la zorgekonservitajn trezorojn kaj montris al ili vojon, vojon surkovritan per rozoj kaj perloj, lumigitan per la radiaro de l'miriado da novaj sunoj, per ĉio, kio estas kara, lumosimila, majesta en sia beleco. Por unua fojo el sub la plumo de N. Rajnov la „orienteco“ reviviĝas vestite en la purpura lumo de sia helvizaĝo, reviviĝas por ĝisvivi sian rekonon, aperas por disverŝi, por aspergi novajn brilojn, novajn tremojn kaj bonodorojn. Miriga brilo denove lumigis la horizonton de la bulgara poezio. Vivportantaj influoj skuis elfunde ĉion maltaŭgan, dediĉitan al morto kaj super malvarmaj nebuloj blovis sunodoro. La laca neĝa kanto de l'pasinto estis mutigita de mil sonoraj, ĉarmaj melodioj de nova himno — plena je vivo, je koloroj kaj radioj, banita en la



sankta poemo de la jarcentoj, riĉega je furioza volupto kaj frenezo de la orienta amo, vualigita per la lunargenta nebulo de la misteroj kaj profundaj sekretoj, ornamita per floroj, miraj legendoj, florantaj nur tra la sabloj de Arabio, en la tendoj de la saĝaj kamelitoj — grizbarbaj beduenoj, kanto volupttremanta, petolema, belsona kiel frivola danco de l'sunradiaro super la dezerto, subtila kiel lotuso floranta sur la supraĵo de la foraj sanktaj maroj, fleksebla kiel lilio, sufokĝemanta kiel la ĉagrenplena kanto de Araba ŝalmo.

Rajnov la unua enportis la orientan elementon en nian poezion.

Ni trarigardu lian verkon „La okuloj de Arabio“. Ĉu tie ne estas pentrita ĝuste la batalo inter du neordinaraĵoj en la animo de la poeto kaj sekve, en la animo de lia popolo? Jen: — Kantisto el nordo, allogite de revoj al foraj orientlandoj kaj dezertoj, forlasas glacian sian patrujon kaj foriras laŭ la kapricoj de sia

varmega deziro, sed ve!, li mortas tie, mez fajraj sabloj lasas sian animon kaj la dezerto festas nigrajn liturgiojn super lia kadavro. Krucumite inter la oriento kaj okcidento, la animo de l'poeto el la neĵaj landoj restas vivi en la sabloturniĝoj de l'dezerto, kanti malbonsignantan kanton en la fanto plenaj meznoktoj. La dezerto estas la plej signifplena merito de N. Rajnov. La dezerto, la oriento per N. Rajnov malkaŝis antaŭ niaj ravitaj rigardoj ĉiujn siajn multekostaĵojn kaj ni vidis ĝiajn nekompareblajn trezorojn. La dezerto aperis antaŭ ni per tuta sia majesteco, pompo kaj belego, per tuta sia ardeco, volupto kaj morto kaŭzata de la neniamsatigebla voluptdeziro. Antaŭ ni ekbrilis miriadoj da izomrudoj, oro, diamantoj, perloj, silko, la rava brilo de stelozaj ĉielfirmamentoj, sangaj rubenoj de flamantaj sunsubiroj en la dezerto. Niajn orelojn atingis nekonataj harmonioj teksitaj el la sonoj kaj bruoj de l'dezerto, la plorado de l'uraganoj, de l'enamiĝintoj.

Ni neklare konis la dezerton, sed per Rajnov ni ĝin observis tute nuda kaj malkaŝa. Nenie estas pli pompa priskribo de l'dezerto. Eĉ ĉe la plej kapablaj posedantoj de la poeziarto ĝi ne estas tiel bele kaj emocie pentrita kiel ĉe N. Rajnov... Kaj... se N. Rajnov estas tradukata kaj legata eksterlande, altigita ĝis la piedestalo de netuŝebleco en nia lando, ĉi tio dependas ne de lia florstilo, ne dank al la majesta muziko, altaj problemoj de la seksamo, morto, sed dank al ĝustrajta kaj arta priskribo de la dezerto. La „dezerto“ glorigos Rajnov'on, ĉar samkiel la pinarbo de Heine revas la foran palmon, la okcidentuloj sonĝas samtiel la dezerton, la landon de la enigmoj kaj ili pritaksos bone la meriton de tiu, kiu ĝin tiel bele pentris.

La oriento, precipe la dezerto, okupas grandan parton de la verkaro de N. Rajnov, ĝi la tuta portas ĝian signon. De ĉi verkoj alblovas la varmego de oriento, la ardeco de l'orienta amo. La dezerto montriĝas per sangfadenoj ĉu en majestaj bildoj, ĉu en poetika formo, terminoj k. t. p. Lia tuta verkaro estas surŝutita per ĝiaj perloj...

Sonĝo de frua infaneco, — realeco pli poste, ĉarmo kaj morto por la animo, ĉiam por li la dezerto estas figuro de io grandega kio trompas la animon kaj poste ĝin sufokas en siaj volupttremantaj ĉirkaŭprenoj.

Por Rajnov la dezerto estas ĉarmo portanta morton, ĉar ĝi estas milda sed trompas, kaŝas simunojn en sia brusto, simunojn de la morto, miraĝojn pentras, sed, la miraĝoj estas mensogo, la trompmensogo — morto.

Kiel grandioza kaj majesta, ĉarmplena kaj pompa estas la dezerto ĉe N. Rajnov; kiom da allogo kaj tento, kiom da diverskoloreco en la dezerta sunleviĝo. Kaj ĉarmo... La ĉarmo en la dezerta mateno kiam: „Ventturniĝas la stranga, freneza ludo — la furioza Araba danco“.

Sed... ja — kiom pli majestaj, lumigitaj per laca ĉarmeco de la dezerta mola krepusko estas la vesperoj, la trankvilportantaj

vesperoj, la mildaj horoj post ardtago kiam la suno estas subirinta, sed nokto ankoraŭ ne venas. Tiam: „Trankvila vento trakuras la dezerton; sur la ĉielo ekbrulas unu post alia steloj; super la plej fora sablomonto densiĝas je nepenetrebla nebulo malvarma bluaĵo kaj... jen! le kamelisto kantas sian dolorkanton“. Kaj kiam la luno malaperas, en la dezerto samkiel en la animo, venas simunoj. Ho kiel danĝera estas tiam la dezerto. La ĉielo similigas ruĝan veluron; sur la sablopintoj turniĝas grizgloboj; sur la manojn la ventego ĵetas sablerojn; de ie for la uragano alportas la bruon de l'beduenaj vagantaj karavanoj kaj ĉio kunmiksiĝas en sovaĝa, majesta koncerto de potenco kaj rezigno...

Duvizaĝa estas la dezerto; duvizaĝa — la nokto en la dezerto. En la animo de N. Rajnov brilas du figuroj de l'orienta nokto: la unua — rebrilo de belo kaj ĉielharmonioj, la alia — resono de amsinforgesa morto. Duvizaĝa estas la nokto en la dezerto... Trompema kiel virino...

Kiom da belaĵoj kaj vivo estas en la lumplena bildo de la trankvila nokto mez sablokampoj... Jen: „Alvenis arĝenta nokto... Nokto en la dezerto. El la krepusko rigardas mil steloj egaj kaj dormemaj kiel la egido de sorĉisto; nenie sono. Sur la hela parto de l'ĉielo dormetas nigraj palmoj; la kameloj kuŝas apud la tendoj; blankas iometo da akvo kaj tie for, sterniĝas la senfina sabla maro kiun rigardas la grandaj stelokuloj, la senlimaj blankaj steloj — la okuloj de Arabio“...

Sed... kiom da senbrida senkatenigita seksamo, voluptkrioj manifestas la noktoj de la dezerta sovaĝa amo kiam: „furioze kungluiĝas lipoj, la korpoj tremas, brusto alpremas bruston, la okuloj estiĝas grandaj samkiel de furioza besto, la korpon trairas volupttremoj, la kapo kliniĝas malantaŭen kaj la tuta mondo momente disrompiĝas; la danĝeraj noktoj, kiam da gejunuloj furiozas kaj plenumas la kruelan akton de l'amo; la noktoj plenplenaj per la mallumo de multaj amrigardoj; dronigitaj en la harmonio de amsopiroj; satigitaj per la agrablaodoro de nudaj korpoj, serĉantaj dolĉan ripozon en la fajra ambaŭplekto.

Ĉe N. Rajnov la dezerto estas trezorejo de beleco kaj morto, profunda saĝo kaj ardaĵoj. Ravaj kaj ĉarmplenaj estas la legendoj de la maljunulo Hareb pri la morlinitaj infanoj de Arabio kiuj dum la tago dormas en siaj marmoraj tombloĝejoj, nokte senkorpe vagas tra la mondo kaj la dezerto ploras por ili, ankaŭ, saĝaj estas la vortoj de l'maljunaj kamelitoj, sed, la ebrigiĝinta de sunvino sango estas pli potenca ol ilia saĝo kaj la ĉirkaŭprenoj de la fajrokula Nefret pli nekontraŭstareblaj ol la forto de la vivo kaj ili ĵetas la animon en la inferon de la sinforgeso kaj de la morto. La saĝeco kaj la volupto batalas kaj interluktas en la dezerto, sed la volupto estas pli potenca, ĉar ĝin helpas la venenhava vino de l'suno.

Same... la dezerto kaŝas saĝon, ĉiu objekto en ĝi estas enigmo. Sed, tie (en la dezerto) regas la morto.

Simile al belflugila papilieto kiu allogita de la brilo trovas senrevene sian morton, la belaĵoj de la dezerto allogas la sonĝemulon kaj poste cindrigas lian animon per fajra pasio... Poeto el malproksima lando eniras la dezerton por vidi la simunojn, sablomontojn, kamelajn karavanojn, palmojn, la piramidojn kaj la nigrajn serpentojn de la dezerto, sed... nigran pasion bruligas en li la trompema dezerto, la nudeco de la brunkolorulinoj lin kaptas per nedisŝirebla potenco, tigraj ĉirkaŭprenoj lin altiras en la nokton kaj tie — en la nokto de la danĝeraj sonĝturmentoj, mez uragano da furiozaj kisoj, ĉirkaŭprenoj kruelaj kiel mortigo, senhonteco de brakoj kaj lipoj, lia animo festas sian fianĉigon kun la ruĝobuŝa, sangokula, kruelega morto.

Tie, en la brakoj de la nigrokulino por kiu la amo estas arda kunplekto kiam la korpo tremas, la okuloj blindas, la animon trairas fajra katafalko kaj en la neniigo de ĉiuj sentoj oni ekkaptas la triumfon de l'morto — mortas, ve, li...

La dezerto, la virino kaj la suno lin mortigas... Sonĝo estiĝas lia vivo kaj la nokto — fantomo en la sonĝo... Ardrigardo teksas fajrajn katenojn kiuj bruligas lian karnon, ĉar la spirito jam mortmutas. Ĉagreno disŝiras lian animon... kaj li jam komprenas ke la dezerto ne estas fabelo; la dezerto estas danĝera sonĝo, kiu dispecigas la animon...

Trompas kaj mortigas la dezerto, ĉar tie en la dezerto estas dezerto pli senakva, pli trompmiraĵa, kun pli da kruelaj simunoj, la dezerto — virino.

Trompas la virino... Trompas la dezerto... kaj ili ambaŭ portas morton...

La dezerto, la amo kaj la morto estas similaj — jen estas la reganta ideo en la verkaro de N. Rajnov.

Sed Nikolaus — la poeto el nordo amas malgraŭ ĉio la dezerton, ĉar ĝi donacis al li morton... kaj nur al ĝi li dediĉas sian korpon.

„Kiam mi mortos, en la dezerto enterigu min, tie enterigu la bardon el nordo!

For de la tendoj elportu min, miaj brunkoloraj fratoj; en a sablon entombigu mian korpon.

Senhejme vivis, — senhejman kanton kantos mia animo tra la dezerto“...

Stefan Venkov

Redakcia Komitato:

Asen Grigorov — Zahari Zahariev

ANONCOJ

estas pagataj 2 bulgaraj levoj por cm.

Redakcia kesto

— La nuna numero de la revuo estas dediĉata al la bulgara verkisto Nikolao Rajnov. Ŝajnas, ke liaj verkoj logas al tradukado en Esperanto, ĉar ĝis nun jam kelkaj samideanoj sendis tradukaĵojn el Rajnov. Inter la multaj manuskriptoj la redakcio povas doni lokon nur al kelkaj.

— Pro manko de loko la fina daŭrigo de „La bogomilismo“ de At. D. Atanasov aperos en la venonta numero.

— Fraŭlino Sijka Lapareva kaj s-ro Stojan Orozov, membro de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Societo, blinda samideano, ge edziĝis.

La Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ elkore gratulas.

Lenĉjo el Ruse al ni sendu sian kompletan nomon.

La studenta esperantista societo, pligrandiĝinta laŭnombre (pli ol 50 gemembroj), ekagis fervore. Ĉiudimanĉe estas aranĝataj kunvenoj. Ĉiam kun esperantlingvaj referaĵoj aŭ literaturlegaĵoj. Baldaŭ malfermata kurso por gestudentoj.

La Societo deziras korespondi precipe kun eksterlandaj studentaj societoj.

Adreso: M. D. Popov (por la studenta societo) strato „6 Septemvrij“ № 1 — Sofio (Bulgarujo).

Aŭstria Esperantisto

Kowengasse 12-2-13

Kornenburg
bei Wien

Aŭstrio

Merger

LEK'KONU ITALION!

Ilustritaj Gvidlibroj: *Venecio* L. 8, *Trentino*
L. 3.50, *Rimini* L. 2, *Terni* L. 1.
De Alpoj al la maro, (kajero I) *Italio* L. 3.
Gramatiko de Itala Lingvo per Esp. L. 15.
Vortaro Itala Esperanta L. 5.
Vortaro Esperanta Itala L. 3.
Italaj Rakontoj (De Amicis) L. 3.
De Apeninoj ĝis Andoj (De Amicis) L. 2.50.
Ŝakludado (Giacosa) L. 3.
Cavalleria Rusticana (Verga) L. 2.50.
Pri la devoj de l'homoj (Pellico) L. 3.
La pesto en Milano dum 1630 (Manzoni) L. 2.
Vivo de S. Francisko el Assisi (Carolfi) L. 3.
Tra la Franciskana Urbo Assisi L. 2.
La Padova Lilio, 'S-ta Antono' (Carolfi) L. 5.
Itala Esperanta Revuo (*monata*) jarab. L. 15.
— (Aldonu 20% por sendelspezoj) —
Eld. A. PAOLET
S. Vito al Tagliamento (Italio)

Adreso de la administrejo: strato „Car Boris“, № 69,
Sofia (Bulgario).